



Vª Internacia Esperantista Kongreso

BARCELONO

5 ĝis 11 de Septembro 1909-a

Al la Esperantistaro,

La lastaj okazintaĵoj de Barcelono, devigas min, min turni denove al la legantoj de « La Revuo » kaj ĝeni ilin per mia prozo. Mi petas, de ĉi tie al ĉiu gazeto esperantista senkulpigon tial, ke mi ne turnas min rekte al ĉiu por doni la klarigojn necesajn en la nunaj momentoj; estas nun tro malfrue, mi vere ne havas tempon, la Oficejo de la Kongreso estas supersutita de leteroj, mendoj, aligiloj kaj vizitantoj.... Mi petas do, ke ĉiu direktoro de ĵurnalo, ke ĉiu prezidanto de societo legu la jenajn vortojn kiel adresitajn al li.

Jus alvenis al mi letero de Sinjoro Bourlet, per kiu li proponas al mi kelkajn rozkolorajn paĝojn de « La Revuo » por klarigi al la esperantistaro la veron pri la lastaj Barcelonaj okazintaĵoj. Mi konfesas, ke la koloro de tiuj paĝoj allogis min, kiu, kiel ĉiu fervora Esperantisto, pentras ĉiam nian estontecon per plej helaj rozkoloroj. Sed, ĉar vero ne havas koloron kaj nur estas diafana — eble pro tio ĝi estas ofte malagraba — mi klopodos, skribante, ne pensi pri koloro ajn; tamen mi petas Sinjoron Bourlet, li ne distre presigu tiun ĉi artikolon sur la kovertojn de « La Revuo », kies koloro ne multe helpus trankviligi la prave timigitajn de la gazetoj spiritojn.

Barcelono kuŝas ankoraŭ apud la Mediteraneo.

Kvankam tio povas ŝajni miraklo, post la Dantaj raportoj de multaj Eŭropaj ĵurnaloj, Barcelono kuŝas ankoraŭ en la sama loko, sur kiu ĝi kuŝis antaŭ la 20 de Julio. Stranga afero: la Rambloj estas, kie estis; la domoj staras, kie staris, kaj la strato Pelayo detruita de la kanonoj reaperis sorĉe sendifekta kaj tute same kiel ĝi estis. Neniu scivolema homo povas rifuzi, konstati okule tiajn mirindajn okazintaĵojn, kiuj venas ne de tio, ke oni rekonstruas rapide en nia lando, sed de tio, ke la imago de la plimulto da ĵurnalistoj malkonstruas tro rapide kaj facile.

Kompreneble, en Barcelono io okazis kaj ni ne ĝin neos; sed la rapida tragedio fariĝis komika tra la plumoj de la raportistoj; tiel komika, ke ni mem ridetas, kiam nun ni estos devigataj certigi la gesamideanojn pri nia ekzisto kaj pri la ne unu solan momenton haltigitaj kongresaj aranĝoj.

De la unua momento, ni komprenis, ke tiaj okazintaĵoj kaj la raportoj pri ili faritaj, timigos la kongresontojn kaj malpligrandigos la nombron de la aliĝintoj al la Kvina Kongreso. Tial ni vizitis la ĉi tieajn aŭtoritatojn por havigi al ni aŭtoritatajn vortojn, per kiu trankviligi la esperantistojn. Ni trovis ĉe ili la plej kuraĝigajn kaj simpatiajn frazojn. Ne kontentaj ankoraŭ, ni sendis al Madrido nian Vicprezidanton, S^{on} A. Sabadell, kiu vizitis la Ministrojn, kaj post tiuj vizitoj mi povas nun ree inviti la gesamideanojn kunveni al Barcelono, kie ili trovos ne nur la ĉiaman trankvilon de la urbo kaj de la lando, sed la rajton kunsidi kaj okazigi la Kongreson kiel estis decidite.

Barcelono estas trankvilega, kaj la esperanta movado daŭras tie ĉi, kiel ĉiam. Oficiale, en la Universitato, Doktoro Bremon faras sian kursón pri Esperanto; en ĉiu esperantista societo okazas la kursoj kaj kunvenoj en plena trankvileco, la teatroj funkciadas, en la kafejoj svarmas la popolo, kaj observante la sanan staton de la urbo, oni tuj vidas, ke la lastaj okazintaĵoj estis nur malgranda malvarmumo de fortika, kvieta korpo.

La sekureco de enlandanoj kaj eksterlandanoj ne malaperis unu solan momenton eĉ dum la revoluciaj tagoj; nun, pli granda ol neniam estas la sekureco kaj la trankvilo.

Vojaĝo.

Ni sendis antaŭ kelkaj tagoj al ĉiu kongresano broŝuron, en kiu troviĝas informoj pri la vojaĝo, kune kun la rabatfolioj por francaj kaj hispanaj fervojoj.

Mi povas aldoni nun, ke krom la speciala oficisto, kiun ni havos en Port-Bou, la Esperantistoj tie renkontos Sinjoron oficiron Mujica, el Madrido, kiu deĵoras en la landlimo, kaj plej fervore sin proponis, li kaj lia familio, por akcepti kaj helpi ĉiun, kiu sin turnos al ili poŝtkarte.

Ni certigas la vojaĝontojn pri la plej granda komplezo de la flanko de la doganistoj en Port-Bou. Kompreneble ni ne povas *oficiale* doni pli grandajn klarigojn pri tio ĉi. Montru nur vian kongreskarton.

La Libro de la Kongreso.

Oni laboras senĉese, en la Esperanta Presejo de J. Horta, la Libron de la Kongreso, kiu estos bela memoraĵo de nia kunveno en Barcelono. Ĉar pro la lastaj okazintaĵoj, multaj ne povis aliĝi antaŭ la 1 de Aŭgusto — templimo de la senpaga akiro de tiu libro — mi sciigas, ke ni decidis doni ĝin senpage al ĉiu aliĝinto al la Kongreso ĝis la 1 de Septembro.

La sieĝa stato.

Ni povas duonoficiale certigi la Esperantistaron, ke post kelkaj tagoj, la sieĝa stato ne estos plu en Barcelono. Tamen, se ĝi daŭrus, oni devas atenti tion, ke ĝi estas ne simila al la sieĝaj statoj de aliaj landoj, kaj ne havas la gravecon, kiun multaj kredas.

Postkongresaj ekskursoj.

Ĉiu kongresano devas ĉeesti la festojn, kiujn preparas al ni niaj samideanoj de Sabadell. Sabadell estas bela industria urbo tre proksima de Barcelono (39 kilometroj). Ĝi kuŝas sur la vojo, kiu kondukas al la Monto Montserrat, mirindaĵo de Katalunujo, kiun oni ankaŭ devas viziti. La kosto de tiuj ekskursoj estas tre malkara, ĉar oni ne devas forgesi, ke en Montserrat la vojaĝanto devas pagi nenion por la loĝado.

La Komitato celis aranĝi la ekskursojn tiamaniere, ke oni povu ĉeesti ĉiun, kaj ke unu ne malhelpu la alian. Ni donos jene la programon kaj prezojn proksimumajn de la ekskursoj, pri kiuj oni ricevos definitivajn informojn dum la Kongreso en Barcelono mem.

11 de Septembro. — *Sabato.* — La solena ferma kunsido de la Kongreso havos lokon matene kaj posttagmeze. Je la 5-a horo, foriros la vagonaro al Sabadell, kiu kondukas al tiu urbo en duono da horo. En Sabadell, ni estos oficiale akceptitaj de la aŭtoritatoj, vespermanĝos kune en solena festeno kaj ĝuos la belan feston (publikaj dancoj, artefaritaj fajroj, koncertoj), kiun preparas al ni la tieaj Esperantistoj interkonsente kun la Loka Komitato. La industria lernejo de Sabadell preparas eldonon de portreto de Doktoro Zamenhof teksita sur silko. Por tiu portreto, laboras jam de du monatoj, ĉiutage kaj nokte la lernantoj de tiu grava Lernejo.

Je noktomezo, tiuj, kiuj frue aliĝis kaj faris la peton al la Komitato havos en Sabadell dormoĉambron por tranokti. Sed ĉar la loko en la Hoteloj de la urbo estas limigita, oni preparis specialan vagonaron, kiu rekondukos nin al Barcelono.

Kiu ne volos resti en Sabadell, povos senhalte vojaĝi al Montserrat; sed ni konsilas ĉiun viziti tiun urbon. La kosto de la vojaĝo al Sabadell kun vespermanĝo kaj reveno al Barcelono, aŭ restado en Hotelo de Sabadell estos ne pli alta ol 7 pesetoj!

12 de Septembro. — *Dimanĉo.* — Matene (je la horo, kiun oni difinas kaj sciigos dum la Kongreso en Barcelono) foriros de Barcelono speciala vagonaro al Monto Montserrat. Tiun saman vagonaron prenos la Esperantistoj, kiuj restis en Sabadell. Nur vidinte ilin, oni povas imagi la belaĵojn entenatajn en tiu grandega Monto, kiu staras sur ebenaĵo tre proksima al Barcelono. La ekskursoj, kiujn oni povas fari en ĝi estas multenombraj. Altegajn pintojn, al kiuj oni iĝas rajdante sur muloj, profundajn grotojn plej fantaziajn... kial priskribi? Vidu vi mem. Memoru nur, ni, ke en Montserrat oni devas pagi nenion por logi, kaj ke la unua afero, kiun oni devas fari alveninte tien, estas mendi ĉambron de la benediktoj. Oni eĉ povas kuiri al si mem la manĝaĵon, sed ni konsilas al niaj samideanoj, kiuj ne estas tre lertaj en la Savarina arto, ke ili uzu la servon de la bonaj mal-karaj restoracioj, kiuj troviĝas en la montaro.

La kosto de la tuta vojaĝo iro de kaj reveno al Barcelono, manĝoj, kaj kelkaj ekskursoj dum tri tagoj estos proksimume 30 pesetoj; ĝustajn senerarajn informojn oni ricevos dum la Kongreso.

Ekskurso al Valencio.

En Valencio, urbo de suno, de floroj, de belaj knabinoj kaj de gajo, kuŝanta apud la maro, okazas nun Ekspozicio. Esperantistoj trovos plezuron vizitante ĝin, kaj certe ne ellasos la okazon. La ĉi tieaj samideanoj, interkonsente kun la 5-a Komitato aranĝis ekskurson al Valencio, akceptante la koran inviton, kiun al ni faras la aŭtoritatoj kaj gravaj personoj de tiu urbo (1).

Ekskurso al Insuloj Balearaj.

Oni vojaĝos amase al Insuloj Balearaj de Valencio post vizito de la Ekspozicio, forirante la 18 de Septembro, je la 3-a horo posttagmeze, en oportuna vaporsipo. La restado en la insulo dependos de la volo de l'ekskursanoj; tamen, estas specialaj biletoj por grupoj, pri kiuj oni ricevos informojn dum la Kongreso mem.

Oni povos ankaŭ iri al Insuloj de Barcelono, tuj post la Kongreso kaj ne vojaĝinte al Valencio.

Por la ekskurso al Insuloj oni devas kalkuli ne malpli da 100 pesetoj de elspezoj.

Dum la Kongreso, la Esperantistoj trovos specialajn sekretariojn por ĉiu ekskurso, kiuj donos al ili ĉiujn necesajn informojn kaj akceptos la aligilojn kaj antaŭpagojn de la ekskursoj. Ni donas ĉi tie nur la prezon de la ekskursoj, por ke la samideanoj provizu sin per la sufiĉa mono; kaj ni ne donas aliajn detalojn, ĉar ni konstatis en aliaj kongresoj, ke kvankam oni penis antaŭklarigi ĉion, ne nur oni repetas informojn jam donitajn, sed nepraj lastaj ŝanĝoj en la programoj nuligas la antaŭdonitajn informojn.

GRAVA SCIIGO. — Post aktiva laborado, S^o Claramunt atingis por la Kongresanoj rabaton da 20% sur la biletoj de la jenaj Kompanioj de Vaporŝipoj inter Ĝenovo kaj Barcelono :

Lloyd Italiano, La Veloce, Itala Ĝenerala Kompanio.

Por aĉeti la rabatitan bileton, montru nur la kongreskarton kaj la rabatbileton de la hispanaj fervojoj, kiun la komitato sendis al la Kongresanoj.

• Ĉu ni devas aldoni, ke la Kongreso nepre okazos en Barcelono?

La Loĝada-Fako ne haltigis sian laboradon, nek la Festa-Fako, kaj en la momento, kiam mi skribas tiujn ĉi vortojn, la nombro de en-skribitaj kongresanoj estas 736. Ĉiam senhalte alvenas novaj aligiloj, kio pruvas, ke la esperantistaro estas decidita entuziasme veni.

(1) Vidu sur la paĝo 5 apartan artikolon de nia kunlaboranto V. Inglada.

Karaj samideanoj, timu nenion! venu amase al Barcelono! Legu aŭ kreu nenion, kion raportas la journaloj, tiuj teruraj mangeguloj de sciigoj, kiuj en somero, kiel la vojaĝanto de l' dezerto, nur revas oazojn, kie paŝti. Kaj pensu, ke ĉar oni tiel multe parolis pri Barcelono tra la tuta mondo, nia kongreso ĉi tie, pli ol neniam aliffores la atenton de la internacia publiko.

Ĝis tuja revido!

Barcelono, 10 de Aŭgusto 1909.

Fred. Pujolà y Vallès.

Valencio kaj la Postkongreso.

La semajno de la Kongreso, en kiu la homoj de malsamaj landoj kaj rangoj nur kredas sin fratoj, kaj forgesante la terajn malpacojn, dediĉas sin al ĝuado de la ĉielaj plezuroj de vivado familia, alproksimiĝas jam per rapidegaj paŝoj. La hispanaj samideanoj laboras febragite en tiuj ĉi lastaj tagoj, por ke la akcepto al la kongresanoj estu inda je la eminenteco kaj sindoneco de la karaj gastoj, kaj ĉiuj Esperantistaj grupoj konkuras pri la aranĝo de allogantaj ekskursoj, pri la pretigo de ĉarmaj festoj.

El ĉiuj urboj Barcelono direktas kaj prezidas tiun grandiozan prepon kaj sin montras inda je la honoro de kongresurbeco.

La Organiza Komitato ne ripozas unu solan momenton: Lia Prezidanto, S^o Frederiko Pujolà metas je la dispono de tiu sankta afero la tutan provizon de sia eminenta talento kaj aktiveco, ame kaj efike helpata de sia bela edzino; la vicprezidanto, S^o Alfonso Sabadell, kies taŭgeco kaj ĉiampreteco por tiaj aferoj estas jam proverbe konitaj, nur dediĉas sin al la Esperanta Kongreso, kaj same ĉiuj ceteraj distingindaj komitatanoj kunlaboras, kiel permesas ilia kompetenteco.

Ekster la Kongreso oni nun entuziasme aranĝas gravan Postkongreson en Valencio. Ĝi estas pretigata kun la helpo de la Valencia Urbeŝtaro, de la Komitato de la Valencia Regiona Ekspozicio kaj de la Muzika Konservatorio, kiuj invitis D-ron Zamenhof prezidi ĝin kaj ricevis lian konsenton.

Valencio, tria ĉefurbo el Hispanujo, kun 220.000 loĝantoj, kuŝas sur vastega fruktodona ebenaĵo, je 4 kilometroj de la Mediteranea maro. La haveno komuniĝas kun la urbo per du elektraĵ tramvojoj kaj tri fervojoj. Ĝi estas unu el la plej gravaj hispanaj havenoj.

La klimato de Valencio, ĉarmas per sia milda temperaturo (11 gradoj minimuma mezo). Ĝia ĉiam hela ĉielo respregulas la belecon de l'marbluo.

De Barcelono al Valencio la vojaĝo estas komforte farita en vagonaro, kiu trairas dum tago la interspacon en kelkaj horoj. La vagonaro glitiras apud la maro kaj permesas vidi belegajn pejzaĝojn, al